Pothier FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO. N° 5

--- OKTOBRO 1968 ---

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Redaktas: S-ino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27- LES ANDELYS

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 15-a de marto, 15-a de junio, 15-a de septembro kaj 15-a de decembro.

=====================================================================

ENHAVO:

Paĝoj: 1 & 2: Mia unua universala kongreso
3: Vivo de la grupoj
3 & 4: Filatela angulo
4: Paĝo de la infanoj
Kotiztabelo

=====================================================================

## MIA UNUA UNIVERSALA KONGRESO.

La Esperanto gazetaro detale raportos pri la 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrid, tial mi limigos min al pritraktado de mia persona sperto.

Post laciga vojaĝo per trajno, kies vagonoj estis plenŝtopitaj de pitoreska samsortanaro, mi alvenis en Madrid, sabaton, la 3-an de aŭgusto, ĉirkaŭ la 7-a vespere; laŭtparolilo arigis la gekongresanojn, kaj, dank' al trafa akcepta servo, baldaŭ ĉiu atingis sian hotelon; mi tuj konatiĝis kun mia kunloĝanto, afabla Jugoslavo Oton Pencer.

La saman tagon, mi ĉeestis la interkonan vesperon, kaj, por la unua fojo en mia vivo, mi ĝuis la popolamasan esperantan zumadon: ĝojkrioj, ridoj, alvokoj, vigla interbabilado, kies kunmetaĵo estigis tute specialan etoson. La celo de interkona vespero estas ebligi la renkontiĝon de la kongresanoj kaj "degeli la glacion". Tre rapide estis plenumita tiu celo.

Post ripoziga nokto, mi ĉeestis, dimanĉon matene, la inaŭguron de la kongreso en Palaco de la Muziko. Impona manifestacio: bonvenigaj deziroj fare de la hispana registaro, de multnombraj alilandaj ambasadoroj, salutoj nome de ĉiulandaj asocioj forte impresis. Mi ĝuis la festparoladon de D-ro Lapenna, peco de aŭtentika klasika elokventeco.

Posttagmeze, mi vizitis la kongresejon, kiu situis en granda kaj oportuna "Palaco de la sindikatoj"; tie mi ricevis la kongresajn dokumentojn. Mi intencis ĉeesti la hispanan vesperon, sed, pro lastmomenta ŝanĝo de la prezentejo, mi rezignis.

Se oni volus partopreni ĉiujn programerojn, oni ne povus elteni, ĉiu do elektas siajn proprajn interesaĵojn, interalie mi partoprenis:

- ĝeneralan kunvenon de U.E.A.
- koncertprelegon de S-ro Dupuis, francdevena Svedo, pri "Festa tago en Parizo", prezentado, per diapozitivoj, de la plej tipaj vidindaĵoj en Parizo;
- oficialan balon;
- teatran prezentadon de la Internacia Teatro Arta;
- varian artan vesperon;
- kaj la morale devigan fermon de la kongreso.

Tiu programo lasis sufiĉe da libera tempo por konatiĝi kun la madrida vivado, vagi laŭ la stratoj, viziti la ĉefajn vidindaĵojn, ne forgesante "Prado"-muzeon, "El Retiro"-parkon; cetere, en la kadro de la kongreso estiĝis ekskursoj al Escorial, Segovia, Toledo kaj en la ĉefurbo mem.

Tro rapide forflugis la tagoj, kaj, sabaton, la 10-an, mi estis reironta al la norda stacidomo. Pli komforta estis la vojaĝo, ĉar sinjorino Vincent konas sekreton por havigi, de la hispana vagona oficisto, bonan sidlokon.

Nun, mi reprenis la fluon de la kutima travivado, kiuj impresoj surflosas?

Unue: Esperanto estas tre serioza afero; ni ja tion bone scias, sed, kiam oni konstatas, kiel respekteme ĝin traktas oficialaj ŝtataj instancoj, kiam oni vidas, ke eminentuloj, elstaraj en siaj fakoj, al ĝi sindonas, oni ne plu dubas pri ĝia estonteco.

Due: Esperanto estas senkompara ilo de interkompreno kaj interfrateco; dum la kunvenoj, dum la tuta tago en la kongresejo, oni forgesis ĉion, kio aliokaze apartigas, malsamigas, eĉ kontraŭigas la homojn; sur la stratoj, ekvido de la verda steleto alvokis afablan saluton, mangestadon, kelkminutan babiladon.

Mi devas tamen atentigi pri ia infekta bakterio, kiu facile ekkaptas la kongresanojn: apenaŭ martela frapo signas la disiĝon, oni sentas la deziron, la nepran neceson partopreni la venontan!

MARTIN Camille, Lisieux.

## VIVO DE LA GRUPOJ.

CLEON. Rekomenciĝo de la kursoj en oktobro en la aŭtomobilfabriko.

DOMFRONT. Baldaŭa rekomenciĝo de la kursoj. La Esperanto-grupo fariĝos sekcio de la loka kultura asocio.

LE HAVRE. S-ino Lucas gvidas unuagradan kurson por 7 gejunuloj; S-ino Lavallée prizorgas la dua- kaj triagradajn.

LES ANDELYS. 22-an de septembro: la kermeso okazis kun sufiĉa sukceso. Fine de septembro, 7 knabinoj revenis al la Esperanto-kurso por perfektiĝi. Por la plenaĝuloj, la perfektiga kurso rekomenciĝis la 10-an de oktobro.

La kultura Zamenhofcentro aranĝos semajnfinon okaze de la Zamenhoftago: la 14-an de decembro vesperon pri Hispanujo kaj Turkujo; la 15-an, komunan tagmanĝon en restoracio, dum kiu oni parolos nur en Esperanto. Informojn kontraŭ afrankita koverto al S-ino Vincent, rue des Oiseaux 27-Les Andelys.

YVETOT. Fine de junio okazis sesio de "Atesto pri Lernado". 5 lernantoj de la publika kurso provis la ekzamenon. Ĉiuj sukcesis, 2 el ili kun cito "Bone" kaj unu kun cito "Tre bone".

La 2-an de oktobro okazis la Ĝenerala kunveno de la Centro por reelekti la estraron kaj diskuti la projekton de propagando kaj kursoj dum la nova lernjaro.

La plej bona lernanto, S-ro Saunier, gajnis en la konkurso de C.N.E.O. restadon en Jugoslavujo, sed bedaŭrinde ne povis ĝin efektivigi pro gravaj familiaj kialoj.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## FILATELA ANGULO.

ESPERANTO-LIGO FILATELISTA (ELF) kunigas en 13 landoj 60 membrojn, kiuj rajtas uzi la servon de interŝanĝo kaj estas regule informitaj pri la apero de novaj filatelaĵoj rilatantaj al Esperanto.

Pliajn informojn kontraŭ afrankita koverto al

S-ro J.A.Rousseau 64, avenue Jean Moulin PARIS XIV

-:-:-:-:-

Multaj esperantistaj kolektantoj deziras koni la esperantisto kaj la apogintojn de Esperanto pri kiuj oni eldonis poŝtmarkojn. En tiu rubriko, ni skribas pri la opinioj de konata aviadistino kaj pioniro de raketaviadilo.

Maryse BASTIE (1898-1953)

En 1955 estis eldonita aera poŝtmarko (Yvert n° 34), pro la dua datreveno de la morto de tiu aviadistino.

Maryse Bastié ricevis la gradon "Komandanto de la Honorlegio" pro esceptaj milittitoloj kaj rezistagoj. Ŝi estis la unua virino, kiu ricevis tiel altan distingon kiel milittitolon.

En sia letero de la 25-a de aŭgusto 1947, respondante al Loui Perret, kiu petis ŝian opinion pri Esperanto, ŝi plezure skribas al li "quelques lignes, étant depuis de longues années convaincue de l' utilité de cette langue. Dans mes nombreux voyages, j' ai toujours souhaité l' emploi d' une langue internationale commune. L' Esperanto, simple et facile, devrait être obligatoire."

Robert ESNAULT PELTERIE ( 1881-1957)

En 1967, estis eldonita poŝtmarko (Yvert nº 1526), pro la 10-a datreveno de la morto de tiu pioniro de raketaviadiloj kaj kreinto de la aviadiloj "REP".

Jen lia opinio pri Esperanto:

" Je suis entièrement convaincu du grand mérite de la langue auxiliaire Esperanto et de son utilisation toujours plus grande dans les relations internationales."

Artikoloj pri Robert Esnault Pelterie aperis en la filatela revuo "L' Echo de la Timbrologie", majo kaj junio 1967.

Noteto; la artikolo estas verkita, propravole, en du lingvoj por doni pli da vereco al la esprimaĵoj de la apogintoj.

Tiuj esprimaĵoj aperis en 1947, en la " Feuillets encyclopédiques de Documentation Espérantiste"- Série Opinions et Voeux-Aviation." Série G-Division 1- Fº 90.

CHAMARET Gustave, Elbeuf.

===

PAĜO DE LA INFANOJ.

LA ŜAFARO DE FRANCISKO ( daŭrigo)

Francisko havas dudektri ŝafojn. Estas bela ŝafaro. Li bone konas ĉiujn siajn bestojn. Estas la "moutouns" (ŝafoj) kun dikaj volvitaj kornoj, la "tronches", kiuj estas ŝafinoj kun malgrandaj kornoj. Francisko ne konfuzas ilin kun la "bourines", kiuj havas sur la nazo malgrandajn brunajn makulojn kaj kun la "roussettes", kun flavruĝa lano.

Kaj estas la aro de la "manis", la ŝafidetoj, kiuj saltas kaj kapriolas, kaj kiuj ankoraŭ estas, kiel Francisko, etaj infanoj.

( daŭrigota)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO.

Union des Espérantistes de Normandie . . . . . . . . . . . . 2 F
Kasisto: S-ro E. Jouis p.ĉ.k. Rouen 283-40 E

U.F.E. (kun "Recue Française") . . . . . . . . . . . . . . . . 30 F
U.E.A. ( kun "Esperanto" kaj Jarlibro) . . . . . . . . . . . . 35 F
Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto p.ĉ.k.Rouen 2348-06

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 4ème trimestre 1968. La gérante: Mme J. Vincent.

Polycopié par le Centre Culturel et
d' Amitié Internationale Zamenhof
27-Les Andelys.